

AVANCO 2'91

oficiala organo de kuba esperanto-asocio

Spite la ventojn...

Orlando Raola G.

Finigas la jaro 1991. Ĝin plenigis plej mirindaj okazaĵoj, fojfoje tre maltrankviligaj. Danke al la nuna eksterordinara disvolviĝo de la amaskomunikiloj, preskaŭ ĉiu homo sur la planedo havis la ŝancon, jen angore, jen spirhalte, sorbi la novaĵfluon el la Persa Golfo, Suda Afriko, Hajtio kaj el diversaj regionoj de la dismembriĝintaj Jugoslavio kaj Sovetio.

Nia lando, Kubo, ankaŭ restis la tutan tempon fokuse de la tutmonda atento. La drastaj politikaj transformiĝoj en la landoj de Centra kaj Orienta Eŭropo kie regis socialismo, kaj la ŝoka disfalo de tiu sistemo en la landego kie ĝi unuafoje ekestis antaŭ sepdeko da jaroj, nuligis la ĉefajn fontojn de brulaĵo kaj nutraĵoj de la lando, forigas de ĝi la plej valorajn komercajn partnerojn. Samtempe pludaŭras la obstino kaj absurdo de la usona registaro, kiu malpermesas al Kubo la akiron de plej bezonataj varoj de la historiaj kaj ĉenature logikaj provizintoj. Kaj la decido de la kubanoj pluesplori la socialisman vojon kun la celo konstrui pli ĝustan kaj superan socion sub tiuj ambaŭflankaj premejoj devigas al la politikaj kaj registaraj in-

stancoj deklari la tiel nomatan Specialan Periodon dum Paca Tempo. Je la alveno de 1992 la situacio fariĝas vere kriza: tre limigitaj transportaj servoj enurbe, interurbe kaj ĉefe interprovinco; nepreco ege malaltigi la uzon de elektra energio kaj plej diversaj malfacilaĵoj por akiro de la ĉiutagaj bezonaĵoj.

Estus redundance klarigi, ke ĉiaj specaj kulturaj agadoj devas trasuferi reduktiĝon pro la materia premateco nun efikanta. Kiel plej frapan ekzemplon ni menciuj la malaperon aŭ severan reduktiĝon de la gazetoj kaj ĵurnaloj, la neebleco je plua libroeldonado.

Ĉio ĉi devigas nin multe pricerbumi pri la agado kaj disvolvo de Kuba Esperanto-Asocio sub la specialaj kondiĉoj de la jaro 1992. Tiuj, kiuj sociologie esploris la ekziston kaj disvolviĝon de la esperanta komunumo asertas, ke kun ege malmultaj esceptoj, la E-movado evoluas nur en socioj sataj. Nun endas analizi, ĉu ni lokos nin inter la raraj esceptoj aŭ meze de la griza regulo kiu kondamnas Esperanton al malapero aŭ

daŭrigo sur paĝo 3



havano, la 31an de decembro 1991 • n-roj 3-4/91 • aperas kvarfoje jare (sed ĉijare nur dufoje!) • eldonas kuba esperanto-asocio, pf. 2018, 10200 havano, kubo. telefono 40-4484 • ĉefredaktoro orlando raola gonzález • kunlaboris alberto fernández-calienes, maritza gutiérrez • pliaj kunlaborantoj serĉataj • prezo de unu ekzemplero enlande 0.50 cup, eksterlande 2.00 nlg aŭ 2 irk, pagendaj al nia konto ĉe uea keax-u • subskribitaj artikoloj espri-mas la opiniojn de ties aŭtoroj • ĉiuj rajtoj rezervitaj • reproduktado permesata, bonvolu indiki la fonton kaj sendi du ekzemplerojn al la redakcio.

**Bonvolu montri
vian
kotizkvitancon
antaŭ ol eklegi
Avancon!**

enhavo

Orlando Raola González
Spite la ventojn... 1

la legantoj skribas

letero el Sancti Spiritus 4

pri movado senhalta

Maritza Gutiérrez González
Komunikcela esperantistiĝo:
Ĉu motivaro? 5

la radetoj

Marjorie Bulton
Fragmento el la libro
Faktoj kaj Fantazioj 7

havano vokas...

Nova frekvenctabelo 8

estimataj,

kiel promesite, jen la dua apero de nia revuo en la jaro 1991. Ĝi kompletigas ĉijaran serion, do entenas n-rojn 3 kaj 4. Jes, mi scias, ke vin surprizis la eksterordinara maldikeco de la revuo. Ne timu, la planata kolekto por la jaro 1992 konsistos el kvar numeroj kun la kutimaj 16 paĝoj. Dume ĝuu tiun ĉi mallongigon de *Avanco*, kiu aperas speciale por saluti la ordinaran kunsidon de la Komitato en urbo Bajamo. Ĝis la venonta marto, adiaŭas

granda stagno for de la socioj ĝuantaj altan vivnivelon.

Unue, ni konsciu pri kelkaj trajtoj de la kuba popolo, kiuj absolute for de ĉia ŝovinismo aŭ naciismo, helpas iom kompreni la irotan vojon. La fakto mem, ke Kubo ekzistas kiel sendependa kaj socialisma ŝtato, ilustras la unuan gravan trajton: *spitemo*, ĝi senvalorigas kelkajn leĝojn kaj regulojn, laŭ kiuj oni povas analizi la vivon ĉe aliaj pli rezignaciemaj gentoj. Kaj tio ke vi daŭre kaj daŭre aŭskultos ĉie la dancigajn ritmojn de muziko kuba kaj eksterlanda, kaj ke kie ajn onin trafas larĝe malferma rido kaj eĉ eksploda ridego, atentigas pri la dua trajto: *vivĝojo*, abunda, fekunda kaj sprita, ĝi ebligas ĉi tie kion aliloke saĝaj kaj flegmaj spiritoj taksos absolute neebla.

Se al tiuj ĝenerale komunaj trajtoj de la kubanoj ni adicias aliajn ĝenerale komunajn trajtojn de la tutmondaj esperantistoj: forta enamiĝo al ideo kiu celas plibonigon de la homaj rilatoj super ĉiaj baroj; sufiĉa idealismo por persiste pluagi tiucele, en mondo fojfoje minacata kaj plurflanke dispremata. Jen ni havas la ŝlosilon por scii kion fari, kiel elturniĝi spite la tempojn, spite la ventojn.

Nia laboro tute ne ĉesos, nia agado tute ne malpliigos. Ni senĉese trovos la bezonatajn solvojn, la postulatajn decidojn tiel ke la Speciala Periodo, anstataŭ efiki bremse kaj senesperige, efiku sprone, plikreskige.

Ke ni ne disponas la eblecon utiligi la lernejojn por vesperaj kursoj dufoje semajne? Nu, ni ofertas kursojn dum taglumaj horoj sabate kaj/aŭ dimanĉe, kaj krome funkciiĝos korespondajn kursojn, kiuj ebligas al ĉiuj en la lando, eĉ loĝantaj en plej foraj anguloj, la lernadon de Esperanto kaj ekaktivigo kadre de nia asocio. Ke ne eblas okazigi

tutlandajn renkontiĝojn, kiajn la kongreso kaj la festivalo? Nu, plivigliĝu tiam la regiona kaj interregiona agado; kaj diversaj seminarioj kun limigita partopreno de la plej aktivaj tenu vivaj la kontaktojn inter ni ĉiuj. Ke ne eblas renkontiĝi laŭ la tradicia maniero, ĉe kulturaj institucioj, ofte kun abundo de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj? Ne gravas, ni iru al formoj de klubo vivo, ankoraŭ ne esploritaj de ni, kun aranĝoj pli malgrandaj, kiuj povas okazi eĉ en la privataj loĝejoj de la klubanoj. Kaj tiel plu, ĝis venos pli bonaj tempoj. Al ĉiu baro, nova vojo, kaj ĉiam, ĉiam antaŭen kaj supren!

Kaj kion pri la internacia agado? Kompreneble, nun ĉiuj kontaktoj fariĝas pli valoraj. Inter la prioritatoj de la lando bonŝance troviĝas turismo. Daŭre ni instigos niajn samideanojn turismi al Kubo, kio estos eble bona afero kaj por la socio mem, kaj por la vera realiĝo de la celoj de la esperantistoj. Ankaŭ okazos dum 1992 du internaciaj eventoj, kie la eksterlandaj gastoj havos la ŝancon, krom turismi, pridiskuti kaj interŝanĝi spertojn kaj opiniojn pri la agado de Esperanto kaj la vojoj al la estonteco. Temas pri *Expolingua '92*, foiro de lingvoj kaj kulturoj kaj pri la internacia konferenco *Esperanto '92*, kiu pritraktos la temon de la rilatoj inter Ameriko kaj la mondo okaze de la kvincenta datreveno de la renkontiĝo interkultura.

Kaj tiel, karaj legantoj de *Avanco*, per ĝusta dozo de optimismo kaj sufiĉe multa laboremo, KEA montros al la mondo kaj al ni mem, ke ĉe ni, ni kovas neestingeblan flamon, ĝi plue lumu!

Fine, post iom da atendado, en nian leterkeston falis dika koverto kaj ĝia ennavo plene feliĉigis nin. Pro tio ke ĝi estas vere modelo tre imitinda, ni aperigas ĝin tuta.

Sancti-Spiritus,
1991.12.23

S-ro Orlando Raola
González

Ĉefredaktoro de *Avanco*

Salutojn, estimata!

Unue mi sendas por vi kaj por ĉiuj, kiuj iamaniere rilatas al la naskiĝo kaj pluvivigado de nia oficiala organo *Avanco*, la plej sincerajn bondezirojn okaze de la nova jaro 1992.

La venonta jaro vere estos Esperanta pro la kvanto da gravaj eventoj, kiujn esperantistoj okazigos nialande. Precipe la Dua Nacia Kongreso, la Tria Festivalo kaj la Konferenco *Esperanto '92* nepre montros, ke la entuziasmo kaj venkemo de la kubaj esperantistoj ja superstaras la malfacilaĵojn nuntempe travivatajn de nia lando. La tuta esperantistaro el Kubo estas preta labori favore de la sukceso de tiuj eventoj.

Do mi aparte kredas, ke *Avanco* ludos gravan rolon kiel informilo kaj propagandilo rilate tiajn eventojn. Krome ĝi estas valora materialo por gelernantoj kaj instruantoj ĉiam plendantaj pro manko da sufiĉaj kaj altkvalitaj instru-kaj lernolibroj. Bedaŭ-

rinde ne ĉiuj profunde taksas la valoron de la revuo. Kial? Eble ĉar ne ĉiuj vere estas esperantistoj. Tio estas nesolvita. Oni devas instrui Esperanton al la asocioj kaj ankaŭ asociecon. Same kiel oni parolas la gepatran lingvon kaj zorgas pri la familiaj aferoj hejme, oni ankaŭ parolu Esperanton kaj zorgu pri la Esperanta familio kaj ties aferoj.

Ĉiun numeron de *Avanco* mi avide legas, ĉar tiel mi scias pri la E-movado kaj profundigas la lingvokonon. Almenaŭ por provincoj malproksimaj je Havano, estas malfacile trovi E-parolantojn, kio malhelpas la praktikadon de la lingvo. Tiel *Avanco* — kaj la E-elsendoj de Radio Havano Kubo — farigas valoregaj iloj por instrui la superan lingvon al finintoj. Ĉu la revuo kaj la elsendoj taŭgus por instrui parolan kaj skriban kurson praktikan post la du bazaj? Almenaŭ en provincoj tio iomete solvus la problemon rilate al la lingvo-uzo. Mi ne estas sperta pri tio, sed ĉe malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj, oni devas duobligi la utilecon de ĉiaj

aĵoj.

Miaflanke mi ĉiam enkondukas artikolon de la revuo en miajn klasojn (ekz. «Fonetikaj problemoj de la kubaj E-parolantoj», fare de Andrés Piñera, *La radetoj*, fare de O. Raola, kiuj aperis en la numero 1/91). Artikolojn pri pli profundaj temoj mi klopodas legi kaj pritrakti inter la finintoj (ekz. «La problemoj de la normo en Esperanto», fare de Michel Duc Goninaz, en la sama numero). Tiamaniere ni ĉiuj lernas la lingvon. Esperanto estis farita, por ke la homoj interkompreniĝu; do, ne estas saĝe, ke ĉiu aparte lernu kaj plu lernu sen transdoni siajn konojn pri ĝi.

Nu, amiko, mi finas. Unu briko ne subtenas domon kaj unu letero ne povas subteni *Avancon*. Tamen mi scias, ke multaj esperantistoj vere amas Esperanton kaj ŝatas la revuon. Ili devas nur kuraĝe reagi.

Ĝis...

Frate kaj samideane,

Norberto Díaz Guevara
Apartado 77
Sancti-Spiritus 2

Komunikcela esperantistiĝo: Ĉu motivaro?

Maritza Gutiérrez

La temo

Ĝi meritas nian atenton, ĉar vaste diskutata kie ajn donas eblecojn plibonigi la laboron de aktivuloj pri informado. Kialoj por esperantistiĝo tiel diversas kiel homoj; sed ni fokusigu nian atenton al motivoj pri kiuj mi persone spertis kaj havas, do interesajn opiniojn, almenaŭ tion mi esperas.

La faktoj

«Multajn homojn speciale allogis la praktikaj eblecoj partopreni pere de Esperanto en la internacia komunikado»¹.

Tio ja estas vaste pruvita vero kaj forta kialo por esperantistiĝo. Ofte mi pensas pri la konkreta manifestiĝo de tiu motivo en nia lando. Ĉu ĝi ĉiam ekzistis? Ĉu influe de la varbintoj la homoj aniĝis al nialanda movado kun tiuj interesoj? Plejmulte ne; sed ĉar la varbintoj mem ignoris tiun argumenton. Kial? Ni pensu pri la komencaj jaroj nialande. Ni loĝas en insulo sufiĉe for de la nomata Esperanto-centro, do, Eŭropo. Ĉar mi apartenas al la «unua generacio» de Esperantistoj, kiuj naskiĝis samtempe ol KEA; kompreneble, la «nulan generacion» konsistigis niaj tiamaj instruantoj, pri kiuj nepre atestos la historio. Nu, mi kiel ano de tiu unua generacio konsideras, ke varbintoj tiamaj ne havis aliajn argumentojn ol lingvaj «bonaĵoj». Kaj do, la tiamaj lernantoj estis allogitaj de simpla sed «propagandefika» alvoko

aperigita en vaste legata ĵurnalo tutlanda. Miakaze estiĝis granda kuriozemo, kaj eventuale multaj aliaj personoj estis kunsente pikitaj.

Tiujare 1979 estis absolute informmanka, ĉar Esperanto kaj ĝia movado estis ĵusnaskitoj, malgraŭ sufiĉe interesaj kaj iom aktivaj antecedentoj konindaj. Ĝuste pro tio, invito al konatiĝo kun la Internacia Lingvo estis efika varbilo. Kion poste? Oni malkovris interesegan mondon kun des pli interesa komunumo; tamen, maltaŭga samtempa varbilo tiama estis promesplena slogano «Esperanto estas facila»; ĝi kontribuis al ŝoka seniluziigo de multaj lernantoj. Min same trafis maloptimismo post la unua konversacia kurso, kiam eltroviĝis antaŭ mia horizonto la gramatikplenaj paĝoj de PAG, tiu por multaj «Esperanto-Biblio». Kompreneble, ankaŭ mi ĝuas ties servojn, sed konsultecle. Senkulpigu min PAG-fanatikuloj! Nu, post tiu epizodo mi bezonis ioman tempon por mensa resaniĝo. Mi postvivis la okazaĵon, sed multaj aliaj interesitoj ne, ĉar ne trovis la promesitan lingvan facilecon kaj decidis forlasi la movadon. Por ili tio estis fina ĉapitro komenciĝinta per slogana varbilo.

La lingvo

El tiu mema sperto estiĝis mia forta malŝato propagandi lingvan facilecon; tiu relativa lingva «bonaĵo» prefere restu kiel unu pli eĉ flanka argumento en la

1 Blanke, Detlev. *Sociopolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1978

varbokampanjo de movadaj aktivuloj.

Laŭlonge de nia lando okazadis similaj fenomenoj; lingva varbilo sloganuza povus havi aliajn delankiĝojn, ĉe pli danĝeraj ol movada forlaso; ĝi povus iel konduki al tro simpliga lingva vojo, kio sub influo de multaj aliaj cirkonstancas kialoj povus kaŭzi movadan ĉe lingvan degeneron. Sed tio ja iusas alian kampojn nekre analizandan ene de la nuntempa patolkomunumo malandaj, iel-aliec in-

formilama laboro kondukas en apartaj regionoj al ne nur movada sed ankav lingva izolitecoj ege tiklaj kaj endanĝerigaj. Sed reirante al la komunikcela movado ĝi iompostome rolas entuziasmige inter la lernantaro, kies kultura nivelo same pozitive efikas en tiu direkto.

La argumentoj

Bonsance mi ĝuis sportavantaĝojn ri-
ate la solvojn proponatajn de Esperanto
por dissalti lingvajn barojn. Mi ja uzis la
lingvon, kaj ĝin uzadas, komunikcele en-
kaj eksperimente. Da utilaj spertoj tiu-
ence ne mankas al mi; do, konsiliĝa pro-
ceso konvinkis min pri la nomata lingva
«boneco». Sed tian konkludon mi pen-
adis, same kiel aliaj esperantistoj ĉe ni.

Okazas, ke neniam ni serioze konsilis,
pro diversaj kaj objektivaj kaj subjektivaj
 kialoj, pri la necesa argumenta laboro
varbocela, kiu rekte influas la kvaliton de
nia movado. «*Am temp, estis*», eblas iel
diri. Mi tre bone scias pri la streboj
tucelaj de la Asocioj stabanaj dum la
lasta jarvino. Nekontesteblaj faktaj
ekzistas: KEA alitas vojon pro-
mesplenan, sed malavaran je obstakloj.
La informo taksas kaj devas resti kiel
prioritato dum la Esperanto-movado kie
ajn klopodas diskonigi kaj disvastigi sian
solvoproporon al komunika problemo.
La UK nialande markis sekvecan linion
sur tiu tereno.

Kuriozozemo estas eterna motivo por in-
stigi homojn al Esperanto-lernado, sed

ĝin oni devas bone starigi sur decaj
argumentoj pri homaj bezonoj je
komunikado, klerigado ks. Kiel aĝi
celstrate? Principe ni alstrebu
malfermitecon kiel alireblan solvon por
vera esperantistigo. Ni prezentu la
lingvon kaj ties solvoproporon sen
troigoj al tordadoj, iam ajn homoj rajtas
kontroli niajn diraĵojn, mi konsciu pri tio!

Ĉu la motivaro?

Nuntempe oni povas aserti, ke sufiĉe
granda elcentaĵo de la kuba es-
perantistaro aliĝis al nia movado pro
kuriozemo kaj eventuala soŭla sento je
kultura eblico. Komunikado vastasence
komprenata povas kaj devus iel regi la
motivaron por plia restado ene de la
landa anaro — pri ĝi indas efektiviĝi es-
ploron certe interesa. Kion post la bazaj
kursoj? La ĉiama solvenda demando, kiu
estas multloje entreprenita ĵen sukcese
ĵen vane, sed ĉiam staranta. Ĝi restu kiel
lasko dekomenca.

Ĉu konklude?

Tute ne. La informa agado estu daŭre
pripensita cele al solvo, ĉe antaŭvido, de
la demando: Kion post la bazaj kursoj?
Unue ni zorgu ne troigi aŭ bonigi la
kvalitojn kaj eblicojn de la lingvo; ni
montru ĝin kiel socian, do vivan
fenomenon, kiu prezentas elikan ilaron
depende de la celoj kaj lerteco de la
scipovanto. Nu, Esperanto proponas kaj
homo disponas (elgrade, kiel ti — la
posedanto — kapablas eliri la
bezonatajn kaj tategajn profilojn
sopiritajn je individuaj spirital kaj
materialaj kialoj.

Se ni varbantoj konscias pri tiu rilato
informado-esperantistigo, la demando
leviĝas tiele: Kiel informi, argumenti,
kvalito de la varbiloj kaj konsekvence de
la movadanoj.

varbokampanjo de movadaj aktivuloj. Laŭlonge de nia lando okazadis similaj fenomenoj; lingva varbilo sloganuza povus havi aliajn deflankiĝojn, eĉ pli danĝerajn ol movada forlaso; ĝi povus iel konduki al tro simpliga lingva vojo, kio sub influo de multaj aliaj cirkonstancakialoj povus kaŭzi movadan eĉ lingvan degeneron. Sed tio ja tuŝas alian kampon nepre analizendan ene de la nuntempa parolkomunumo nialanda; iel-alieĉl informlana laboro kondukas en apartaj regionoj al ne nur movada sed ankaŭ lingva izolitecoj ege tiklaj kaj endanĝerigaj. Sed reirante al la komunikcela motivaro ĝi iompostiome rolas entuziasmige inter la lernantaro, kies kultura nivelo same pozitive efikas en tiu direkto.

La argumentoj

Bonŝance mi ĝuis spertavantaĝojn rilate la solvojn proponatajn de Esperanto por dissalti lingvajn barojn. Mi ja uzis la lingvon, kaj ĝin uzadas, komunikcele en kaj eksterlande. Da utilaj spertoj tiusence ne mankas al mi; do, konsciiga proceso konvinkis min pri la nomata lingva «boneco». Sed tian konkludon mi penadis, same kiel aliaj esperantistoj ĉe ni. Okazas, ke neniam ni serioze konsciis, pro diversaj kaj objektivaj kaj subjektivaj kialoj, pri la necesa argumenta laboro varbocela, kiu rekte influas la kvaliton de nia movado. «*Am temp' est!*», eblas tiel diri. Mi tre bone scias pri la streboj tiucelaj de la Asociaj stabanoj dum la lasta jarkvino. Nekonstesteblaj faktoj ekzistas: KEA aliras vojon promesplenana, sed malavaran je obstakloj. La informa fako estis kaj devas resti kiel prioritato dum la Esperanto-movado kie ajn klopodas diskonigi kaj disvastigi sian solvopropozonon al komunika problemo. La UK nialande markis sekvendan linion sur tiu tereno.

Kuriozemo estas eterna motivo por instigi homojn al Esperanto-lernado, sed

ĝin oni devas bone starigi sur decakargumentoj pri homaj bezonoj je komunikado, klerigado ks. Kiel agi celtrafe? Principe ni alstrebu malfermitecon kiel alireblan solvon por vera esperantistiĝo. Ni prezentu la lingvon kaj ties solvopropozonon sen troigoj aŭ tordadoj; iam ajn homoj rajtas kontroli niajn diraĵojn, ni konsciu pri tio!

Ĉu la motivaro?

Nuntempe oni povas aserti, ke sufiĉe granda elcentaĵo de la kuba esperantistaro aliĝis al nia movado pro kuriozemo kaj eventuala soifa sento je kultura ebleco. Komunikado vastasence komprenata povas kaj devus iel regi la motivaron por plia restado ene de la landa anaro —pri ĝi indas efektiviĝi esploron certe interesa. Kion post la bazaj kursoj? La ĉiama solvenda demando, kiu estis multfoje entreprenita jen sukcese jen vane, sed ĉiam staranta. Ĝi restu kiel tasko dekomenca.

Ĉu konklude?

Tute ne. La informa agado estu daŭre pripensita cele al solvo, eĉ antaŭvido, de la demando: Kion post la bazaj kursoj? Unue ni zorgu ne troigi aŭ bonigi la kvalitojn kaj eblecojn de la lingvo; ni montru ĝin kiel socian, do vivan fenomenon, kiu prezentas efikan ilaron depende de la celoj kaj lerteco de la scipopanto. Nu, Esperanto proponas kaj homo disponas tielgrade, kiel li —la posedanto— kapablas eltiri la bezonatajn kaj taŭgajn profitojn sopiritajn je individuaj spiritalaj kaj materialaj kialoj.

Se ni varbantoj konscias pri tiu rilato informado-esperantistiĝo, la demando leviĝas tiele: Kiel informi, argumenti, varbi? El tio rezultos grandparte la kvalito de la varbitoj kaj konsekvence de la movadanoj.

Laŭ speciala mendo de UEA, la brita verkistino Marjorie Boulton pretigis legolibron por kiuj fininte bazan kurson, deziras plueniri. Ĝi aperis en 1984 kun la nomo *Faktoj kaj Fantazioj*. Kiuj ĝis nun ankoraŭ ne spertis la grandan plezuron legi libron en la Internacia Lingvo, trovos en ĝi la bezonatan enkondukon. Jen ero, nura peceto, donace, malmulte reverkita de la redaktisto por ke la vortokvanto restu je la limoj de nia listo de facila lingvo. Ĝuu la legadon!

Unuaj plumamikoj

Leteroj de plumamikoj estas samtempe la periloj kaj la fruktoj de homa rilato, kiu enhavas, iasence, iaspecan amon. Tiu ĉi amo kutime estas sento de tre granda aŭ profunda; verŝajne ĝi restas pli malpli flanka afero en la vivo. Ĝi similas al eta fajro, ne al ia vasta suno; tamen ameto, same kiel amego, enhavas ian deziron plifeliĉigi alian personon.

Neniu povas detale klarigi, kiel starigi kaj daŭrigi bonan homan rilaton; homoj kaj rilatoj estas tro diversaj kaj niaj sentoj kaj agokialoj restas plejparte nekonataj. Tamen, se ni deziras, ke perletera amikeco pli sukcesu kaj daŭru, ia tre ĝenerala principo helpas. Ni penu plifeliĉigi la alian; do ni konsideru la alian. De tiu principo povas sekvi almenaŭ kelkaj konsiloj.

Celu pli helpi ol gajni! Amiko ofte petas de amiko ian servon kaj interŝanĝo de servoj plifortigas amikecon; sed ne tro frue petu ion de nova plumamiko; kaj ne petu tre malfacilajn servojn aŭ kostajn objektojn. Foje sensperta persono, kiu loĝas en malriĉa lando, ŝajne kredas ke korespondanto en evolulando, povas facile sendi al li vestojn, diskojn, fontoplu-mon, ĉsurbendigilon aŭ fotilon! kaj plej multaj homoj, ankaŭ en riĉaj landoj ne havas sufiĉajn monrimedojn por tiel multekostajn objektojn donaci al ne-proksimuloj. Sed ankaŭ iu, kies vivnivelo

en riĉa lando estas alta, povas forgesi, ke lia korespondanto en malriĉa lando nur per multaj suferoj povus eble sendi al li ion —serion da poŝtmarkoj, ekzemple— kiu por li, la bonŝanculo, estas neniaĵo. Ankaŭ estas multe pli facile sendi ion de unu lando al alia, aŭ ricevi pakajon el eksterlando, en iuj landoj, ol en kelkaj aliaj. Do, ne petu senpripense.

Kompreneble, multaj esperantistoj starigas korespondajn rilatojn kies ĉefa celo estas interŝanĝo de ŝatokupaj objektoj. Tiam ambaŭ atendas petojn kaj donacojn. Tiam ili nur zorgu, ke la interŝanĝoj estu pli malpli justaj ambaŭflanke.

Por respondi al letero, unue relegu ĝin atente. Estas nur bone, gratuli pri iu sukceso, bedaŭri pri iu malfeliĉo, pripa- roli iun interesan novaĵon. Kaj nepre ne forgesu danki la amikon pro donaceto, informo, io ajn kio kostis al li aŭ ŝi monon aŭ klopodon.

Ankaŭ respondu al la demandoj; kial la korespondanto faris demandon, se li ne deziras informiĝi? Kutime, eblas respondi al demandoj, sed en kazo malfacila, almenaŭ klarigu, ke vi ne povas respondi; tiam la korespondanto scias, ke vi almenaŭ rigardis lian demandon. (Eble vi ne scias, kaj ne povas facile informiĝi; eble la demando tuŝas ion, kion vi ne rajtas diskuti; aŭ eĉ temas

Laŭ speciala mendo de UEA, la brita verkistino Marjorie Boulton pretigis legolibron por kiuj fininte bazan kurson, deziras plueniri. Ĝi aperis en 1984 kun la nomo *Faktoj kaj Fantazioj*. Kiuj ĝis nun ankoraŭ ne spertis la grandan plezuron legi libron en la Internacia Lingvo, trovos en ĝi la bezonatan enkondukon. Jen ero, nura peceto, donace, malmulte reverkita de la redaktisto por ke la vortokvanto restu je la limoj de nia listo de facila lingvo. Ĝuu la legadon!

Unuaj plumamikoj

Leteroj de plumamikoj estas samtempe la periloj kaj la fruktoj de homa rilato, kiu enhavas, iasence, iaspecan amon. Tiu ĉi amo kutime estas sento de tre granda aŭ profunda; verŝajne ĝi restas pli malpli flanka afero en la vivo. Ĝi similas al eta fajro, ne al ia vasta suno; tamen ameto, same kiel amego, enhavas ian deziron plifeliĉigi alian personon.

Neniu povas detale klarigi, kiel starigi kaj daŭrigi bonan homan rilaton; homoj kaj rilatoj estas tro diversaj kaj niaj sentoj kaj agokialoj restas plejparte nekonataj. Tamen, se ni deziras, ke perletero amikeco pli sukcesu kaj daŭru, ia tre ĝenerala principo helpas. Ni penu plifeliĉigi la alian; do ni konsideru la alian. De tiu principo povas sekvi almenaŭ kelkaj konsiloj.

Celu pli helpi ol gajni! Amiko ofte petas de amiko ian servon kaj interŝanĝo de servoj plifortigas amikecon; sed ne tro frue petu ion de nova plumamiko; kaj ne petu tre malfacilajn servojn aŭ kostajn objektojn. Foje sensperta persono, kiu loĝas en malriĉa lando, ŝajne kredas ke korespondanto en evolulando, povas facile sendi al li vestojn, diskojn, fontoplu-mon, ĉesurbendigilon aŭ fotilon! kaj plej multaj homoj, ankaŭ en riĉaj landoj ne havas sufiĉajn monrimedojn por tiel multekostajn objektojn donaci al ne-proksimuloj. Sed ankaŭ iu, kies vivnivelo

en riĉa lando estas alta, povas forgesi, ke lia korespondanto en malriĉa lando nur per multaj suferoj povus eble sendi al li ion —serion da poŝtmarkoj, ekzemple— kiu por li, la bonŝanculo, estas nenio. Ankaŭ estas multe pli facile sendi ion de unu lando al alia, aŭ ricevi pakajon el eksterlando, en iuj landoj, ol en kelkaj aliaj. Do, ne petu senpripense.

Kompreneble, multaj esperantistoj starigas korespondajn rilatojn kies ĉefa celo estas interŝanĝo de ŝatokupaj objektoj. Tiam ambaŭ atendas petojn kaj donacojn. Tiam ili nur zorgu, ke la interŝanĝoj estu pli malpli justaj ambaŭflanke.

Por respondi al letero, unue relegu ĝin atente. Estas nur bone, gratuli pri iu sukceso, bedaŭri pri iu malfeliĉo, pripa-rolu iun interesan novaĵon. Kaj nepre ne forgesu danki la amikon pro donaceto, informo, io ajn kio kostis al li aŭ ŝi monon aŭ klopodon.

Ankaŭ respondu al la demandoj; kial la korespondanto faris demandon, se li ne deziras informiĝi? Kutime, eblas respondi al demandoj, sed en kazo malfacila, almenaŭ klarigu, ke vi ne povas respondi; tiam la korespondanto scias, ke vi almenaŭ rigardis lian demandon. (Eble vi ne scias, kaj ne povas facile informiĝi; eble la demando tuŝas ion, kion vi ne rajtas diskuti; aŭ eĉ temas

pri tio, kio laŭ la kutimoj de via lando estas tre persona).

Simile, ne tuj faru demandojn, kiuj povas ŝajni al via korespondanto, ĝenaj... kaj ne forgesu, ke en multaj landoj neamika kontrolisto eble legos leteron el eksterlando.

Penu ĉiam meti oleon, ne ŝtonerojn inter la radojn de rilato.

Ofte du korespondantoj en tre diversaj landoj havas tre malsimilajn ideojn pri diversaj gravaj aferoj. Amika diskutado pri tiaj aferoj povas pli bone informi

ambaŭ homojn, kaj larĝigi du mondrigardojn. Sed ne kredu, ke vi ŝanĝos la vidpunkton de aliideano per longa akra atako kontraŭ ĝi, precipe frue en via korespondado. La ricevinto plejble koleros, aŭ malinteresiĝos pri vi, aŭ supozos ĉe vi fiajn intencojn, eble kredos vin nura ilo de iu registaro, eklezio, partio, malplimulto ktp. Kaj neniu el ni scias tute, ke nia opinio estas perfekte prava ĉiurilate; ĉar kiu povas scii ĉion en la mondo, ĉiujn kialojn en ĉio?

havano vokas...

Horaro valida de 1992.01.26 ĝis 1992.05.03 Ĉiudimanĉe

La Esperanto-redakcio de Radio Havano Kubo ĝoje sciigas al la legantoj de Avanco, ke kiel vi povas konstati en la suba tabelo, ni pligrandigis nian elsendotempon je dudek minutoj. Ni daŭrigu la kontaktojn! Skribu tuj al Radio Havano Kubo, Esperanto-redakcio, poŝtfako 2018, Havano, Kubo.

τ UTC	ν (kHz)	λ (m)	Regiono
0800-0830	11760	25.51	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
1500-1530	17750	16.90	Norda, Meza kaj Suda Amerikoj kaj Karibio
	15340	19.56	
	11760	25.51	
	9505	31.56	
	6180	48.54	
1730-1800	5965	50.29	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	17770	16.88	
	17705	16.94	
2100-2120	17770	16.88	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	17705	16.94	
2330-0000	13700	21.90	Norda, Meza kaj Suda Amerikoj kaj Karibio
	11875	25.26	
	11760	25.51	

pri tio, kio laŭ la kutimoj de via lando estas tre persona).

Simile, ne tuj faru demandojn, kiuj povas ŝajni al via korespondanto, ĝenaj... kaj ne forgesu, ke en multaj landoj neamika kontrolisto eble legos leteron el eksterlando.

Penu ĉiam meti olcon, ne ŝtonerojn inter la radojn de rilato.

Ofte du korespondantoj en tre diversaj landoj havas tre malsimilajn ideojn pri diversaj gravaj aferoj. Amika diskutado pri tiaj aferoj povas pli bone informi

ambaŭ homojn, kaj larĝigi du monddrigardojn. Sed ne kredis, ke vi ŝanĝos la vidpunkton de aliideano per longa akra atako kontraŭ ĝi, precipe frue en via korespondado. La ricevinto plejeble koleros, aŭ malinteresiĝos pri vi, aŭ supozos ĉe vi fiajn intencojn, eble kredos vin nura ilo de iu registaro, eklezio, partio, malplimulto ktp. Kaj neniu el ni scias tutcerte, ke nia opinio estas perfekte prava ĉiurilate; ĉar kiu povas scii ĉion en la mondo, ĉiujn kialojn en ĉio?

havano vokas...

Horaro valida de 1992.01.26 ĝis 1992.05.03 Ĉiudimanĉe

La Esperanto-redakcio de Radio Havano Kubo ĝoje sciigas al la legantoj de Avanco, ke kiel vi povas konstati en la suba tabelo, ni pligrandigis nian elsendotempon je dudek minutoj. Ni daŭrigu la kontaktojn! Skribu tuj al Radio Havano Kubo, Esperanto-redakcio, poŝtfako 2018, Havano, Kubo.

<i>t</i> UTC	<i>v</i> (kHz)	<i>λ</i> (m)	Regiono
0800-0830	11760	25.51	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
1500-1530	17750	16.90	Norda, Meza kaj Suda Ameriko kaj Karibio
	15340	19.56	
	11760	25.51	
	9505	31.56	
	6180	48.54	
	5965	50.29	
1730-1800	17770	16.88	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	17705	16.94	
2100-2120	17770	16.88	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	17705	16.94	
2330-0000	13700	21.90	Norda, Meza kaj Suda Ameriko kaj Karibio
	11875	25.26	
	11760	25.51	